



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 188

Decembro 2001

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5



Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15



JAROFINA MESAĜO



Denove estas apenaŭ kredeble, ke la jaro jam finiĝas. Por tiuj, kiuj memoras la libron kaj/aŭ filmon "2001: Spac-Odiseado", oni apenaŭ povas kredi, ke la ĉefa afero kiun ni nuntempe diskutas rilatas al milit-novaĵo anstataŭ al spac-esplorado. Ne estis aparte feliĉa jaro. Tamen, je tempo de tradiciaj festoj religiaj kaj jarofinaj, oni rajtas esperi ke en la venonta jaro la homaro fariĝos pli pacema, pli amikema, pli tolerema kaj bonveniga.

Por la venonta jaro ni forte esperas, ke vi rapide (re)abonos la gazeteton. Devus esti pli da ni inter ni. Ni ankaŭ bonvenigas viajn kontribuojn. Vi memoru la originalan celon de la gazeteto: provizi ŝancon al ni ĉiuj por ekzerci la kapablon esprimi niajn pensojn kiom eble plej bone. Kiel en diskut-rondo, ni estas inter amikoj kaj ni rajtas esplori la proprajn interesojn. La enhavo de nia gazeteto spegulas la interesojn de la grupanoj inter ni. Alivorte, ankaŭ vi respondecas pri la enhavo.

La redakcio de *Inter Ni* deziras al vi ĉion bonan dum la festa sezono, kiu inkluzivas la Zamenhofan Tagon je la 15a de decembro, kaj bonan legadon dum la venonta jaro.

— la redaktoro

MIA KOMPUTORO

Laŭ la eminentuloj kaj lingvaj moŝtoj, mi havas komputilon. Nuntempe tiu estas la oficiala termino por la granda kaj plejparte amikema aparato kiu troviĝas sur mia skribotablo. Eble mi estas nur obstina maljunulo, sed fiksita en mia menso estas forta opinio, ke mi havas komputoron.

Mi povas bele komputi¹ per mia komputoro. Mi povas nombri, adicii, subtrahi, multipliki, dividi, trovi kubajn radikojn kaj diversajn potencojn, manipuli neimageble grandajn nombrojn, etajn nombrojn, negativajn nombrojn, ktp. Mi povas trovi primojn, faktorojn, faktorialojn kaj plej grandajn komunajn divizorojn. Ĝi ja estas mirinda elektronika meĥanismo por fari ĉiajn matematikajn taskojn.

Tamen, mia komputoro faras multe pli. Ĝi ne estas nur matematika maŝino. Mia komputoro estas mia informstaplo kaj informtrovigilo. Ĝi estas mia memor-helpilo, mia ordigilo kaj mia kalendaro kaj tagplanmontrilo. Ĝi ebligas min krei belajn programojn. Mia komputoro estas mia tekstigilo, mia helpanto kiam mi deziras verki. Ĝi helpas min pensi kaj evoluigi kaj ordigi la pensojn. Per ĝi mi povas provskribi la ideojn, ŝanĝi kaj reŝanĝi, laŭplaĉe. Mia komputoro estas senfine pacienca kaj neniam juĝema pri miaj klopodoj kaj stumbloj. Ĝi estas asistanto, fidela amiko, kiu senplende atendas miajn ordonojn kaj nekredeble obeema (krom tre maloftaj esceptoj). Mia komputoro estas por mi kompostilo, bildigilo, kaj de tekstoj plibeligilo. Mia komputoro estas ankaŭ komunikilo ne nur por skribitaj leteroj kaj verkoj, sed ankaŭ por la elektronika poŝto kaj la Tut-Tera Teksaĵo, mia tuja fenestro al la mondo.

Do, mia komputoro ne estas nur unucela ilo por fari unu specon de tasko. Ĝi estas ĉiofaranto tre kapabla en multaj fakoj. Metafore, ĝi estas kunulo el oro. Mi ordinare ne ŝatas defii la Akademion nek la PIV-vortaron, sed mi opinias, ke mi daŭre nomos mian aparatamikon „komputoro”.

— Steĉjo

¹Laŭ nova P.I.V.: komput/i [tr] Kalkuli per aplikado de algoritmo, precipe per komputilo.

KRISTNASKAJ KANTOJ



Dum jaroj, nia grupano Gene Keyes tradukas kristnaskajn kantojn. *Inter Ni* jam eldonis ekzemplon de lia tradukado. Lastatempe li tradukis angla-lingvan kanton kiel *Venceslas la bona reĝ'*. Gene strebas ĉiam konservi kaj la precizan signifon de la liriko kaj la riman aranĝon, kaj ankaŭ la ritmon de la vortoj por sekvi la melodion. Tio ofte estas tasko neebla. Tamen, por montri la lingvon uzinda kiel internacia tradukilo, Gene strebas sekvi la regulojn de la lingvo por esprimi la signifon de la liriko. Bonan sukceson al li.

— la redaktoro

INTER NI BALDAŬ TROVIĜOS EN LA ESPERANTO-MUZEO EN VIENO

Lastatempe ni sendis numerojn 1 ĝis 183 (majo 1986 - julio 2001) al la Esperanto-Muzeo en Vieno. Tio okazis post diskutoj kun S-ino Helga Farukuoye, kiu laboras plentempe en la muzeo. Ni komence sendis numerojn 153 ĝis 183, por ke ŝi povu vidi, ke *Inter Ni* estas serioza eldonaĵo. Kiam S-ino Farukuoye diris, ke ŝi povus trovi spacon en la muzeo por nia gazeteto, ni sendis du jam binditajn volumojn: numeroj 1-80 kaj numeroj 81-160. Laŭ plano, ni sendos al ŝi numerojn de *Inter Ni* je ĉiuj ses monatoj. En aprilo 2006 ni sendos binditan volumon kun numeroj 161 ĝis 240.

En la Esperanto-Muzeo, krom periodaĵoj kaj diversaĵoj estas 25 000 volumoj. Do, ĝi havas la plej grandan aŭ duan plej grandan kolektaĵon de libroj en la mondo. La oficiala nomo de la Muzeo estas Internationales Esperanto-Museum Sammlung für Plansprachen. Ĝi estas parto de la Österreichische Nationalbibliothek (Nacia Biblioteko de Aŭstrio). Ĝia loko estas sub la Kupolo de Michaelo en la Hofburg (Reĝa Palaco) en urbocentro de malnova Vieno.

Iu ajn kun aliro al la TTT povas mem kontroli la haveblajn librojn. Nur iru al:

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm>

Nia Solvo de la Krucvortenigmo en la aŭgusta numero

O	R	G	E	N	O		S	U	K	E	R	O
K		A			K	R	I			T		R
U	R	S	O		T		M		P	A	L	A
L			P	R	O	S	P	E	R			N
O	B	E	I		B		L		O	M	A	Ĝ
J	A		O	E	R		A	D	Z		B	O
	T			G				I			E	
L	I		B	E	K		A	R	B		L	A
A	K	R	E		O		N		R	E	A	L
K			B	A	R	B	A	R	A			I
T	U	B	O		A		N		K	V	I	N
U		O			N	O	A			I		E
K	A	T	I	D	O		S	A	G	A	C	A

Refoje dankon al Marjorie Boulton